



# Informilo *por* Interlingvistoj

Volumo 33 (kvara serio), numero 2 (127), 2024  
ISSN 1385-2191

*Eldonas*

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)  
[interlingvistiko.net](http://interlingvistiko.net) ♦ [@CED\\_interling](https://twitter.com/CED_interling)

*Redaktas*

Başak ARAY  ♦ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ)   
Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ♦ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: [IpI@interlingvistiko.net](mailto:IpI@interlingvistiko.net)

# ENHAVO

<b>I</b>	<b>Eventoj</b>	<b>4</b>
<b>1</b>	<b>International Symposium on Language Ideologies and Attitudes (IDEOLING), 2024-10-18/19</b>	<b>4</b>
1.1	Loko . . . . .	4
1.2	Temo . . . . .	4
1.3	Priskribo . . . . .	4
<b>2</b>	<b>46-a Esperantologia konferenco dum UK en Aruão</b>	<b>4</b>
2.1	Organizantoj . . . . .	4
2.2	Loko . . . . .	4
2.3	Temo . . . . .	4
2.4	Priskribo . . . . .	4
<b>3</b>	<b>Fifth biannual REAL symposium: Human capital, languages, and new literacies; Theories, policies, and impacts, 2024-06-03/04</b>	<b>5</b>
3.1	Organizantoj . . . . .	5
3.2	Loko . . . . .	5
3.3	Temo . . . . .	5
3.4	Priskribo . . . . .	5
<b>4</b>	<b>Colloque international sur les langues construites, I-Conlang, 2024-07-04/05</b>	<b>6</b>
4.1	Organizantoj . . . . .	6
4.2	Loko . . . . .	6
4.3	Temo . . . . .	6
4.4	Priskribo . . . . .	6
<b>II</b>	<b>Universitata kaj esplora agado</b>	<b>7</b>
<b>1</b>	<b>Kurso «Enkonduko al interlingvistiko»</b>	<b>7</b>
<b>III</b>	<b>Kulturo</b>	<b>8</b>
<b>1</b>	<b>Du artikoloj pri la interlingvo Balaĭbalan</b>	<b>8</b>
<b>2</b>	<b>Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko: Gazeteltondaĵoj 1898–1915: la kolekto Hachette en la interreto</b>	<b>8</b>

<b>3</b>	<b><i>Le Monde</i> publikigas artikolon pri konstruitaj lingvoj, 2024-01-26</b>	<b>9</b>
<b>4</b>	<b>Televida kanalo Arte publikigis videaĵon pri volapük kaj esperanto</b>	<b>9</b>
<b>5</b>	<b>Nova ampleksa artikolo pri «Lingva justeco» en Vikipedio</b>	<b>10</b>
<b>6</b>	<b>Laborrenkontiĝo pri dulingva gepatra infanformigo, Caroline Marshall Draughon Center for the Arts &amp; Humanities, Auburn, Alabamio, 2024-11-06</b>	<b>10</b>

## **IV Personoj** **11**

<b>1</b>	<b>Wim Jansen, 1948 – 2024</b>	<b>11</b>
<b>2</b>	<b>Kariera salto de Başak Aray</b>	<b>12</b>
<b>3</b>	<b>Sabine Fiedler emeritiĝis 2023-11</b>	<b>12</b>
3.1	Biografio . . . . .	12
3.2	Bibliografio . . . . .	13
3.2.1	Libroj . . . . .	13
3.2.2	Fakrevuaj artikoloj . . . . .	14
3.2.2.1	1981 – 1990 . . . . .	14
3.2.2.2	1991 – 2000 . . . . .	14
3.2.2.3	2001 – 2010 . . . . .	15
3.2.2.4	2011 – 2020 . . . . .	15
3.2.2.5	2021 – . . . . .	17
3.2.3	Libroartikoloj . . . . .	17
3.2.3.1	1981 – 1990 . . . . .	17
3.2.3.2	1991 – 2000 . . . . .	18
3.2.3.3	2001 – 2010 . . . . .	19
3.2.3.4	2011 – 2020 . . . . .	22
3.2.3.5	2021 – . . . . .	24
3.2.4	Redaktaĵoj . . . . .	25
3.2.4.1	1995 – 2010 . . . . .	25
3.2.4.2	2011 – 2020 . . . . .	25
3.2.4.3	2021 – . . . . .	27

## **V Bibliografiaĵoj** **29**

<b>1</b>	<b>Tezoj, disertacioj kaj diplomlaboraĵoj</b>	<b>29</b>
<b>2</b>	<b>Fakrevuaj artikoloj</b>	<b>29</b>
<b>3</b>	<b>Libroj</b>	<b>30</b>
<b>4</b>	<b>Libroĉapitroj</b>	<b>31</b>

<b>5</b>	<b>Revu-numeroj</b>	<b>31</b>
5.1	Language Problems and Language Planning . . . . .	31
5.1.1	Language Problems and Language Planning, <b>47:2</b> , 2023. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . .	31
5.1.1.1	Enhavo . . . . .	31
5.1.2	Language Problems and Language Planning, <b>47:3</b> , 2023. ISSN: 0272-2690. E-ISSN: 1569-9889. . . . .	33
5.1.2.1	Enhavo . . . . .	33
5.2	Beletra Almanako . . . . .	35
5.2.1	<i>Beletra Almanako</i> , <b>48</b> , oktobro 2023. ISBN: 9781595694560. ISSN: 1937-3325. . . . .	35
5.2.1.1	Enhavo . . . . .	35
<b>6</b>	<b>Novajleteroj</b>	<b>36</b>

## **I EVENTOJ**

### **1 INTERNATIONAL SYMPOSIUM ON LANGUAGE IDEOLOGIES AND ATTITUDES (IDEOLING), 2024-10-18/19**

#### **1.1 Loko**

Universitat de les Illes Balears, Palma de Mallorca

#### **1.2 Temo**

Lingvoideologioj kaj sintenoj kovrantaj diversajn temojn: lingva politiko kaj planado, potencrilatoj, kulturspecifaj reprezentoj ktp

#### **1.3 Priskribo**

Vidu [la retpaĝojn](#).

### **2 46-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO DUM UK EN ARUŜO**

#### **2.1 Organizantoj**

[La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj](#) (CED), Mark Fettes kaj Bengt-Arne Wickström

#### **2.2 Loko**

Aruŝo kaj rete

#### **2.3 Temo**

Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj, vidu priskribon.

#### **2.4 Priskribo**

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) alvokas ĉiujn fakulojn, esploristojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la 46-a Esperantologia Konferenco. La aranĝo estos hibrida, ebligante partoprenon rete kaj ĉeeste, kadre de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio (de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024).

La programo enhavos plurajn dudek-minutajn referaĵojn elektitajn el inter la ricevitaj proponoj, kun fina rondotablo pri la nunaj esploraj defioj de esperantologio rilate al la traktitaj temoj. Ni bonvenigas proponojn de Esperanto-rilataj esplorobjektoj en fakoj kiel lingvistiko, historio, sociologio, ekonomiko, juro, antropologio kaj literaturaj studoj; ankaŭ interfakaj proponoj bonvenas. Aparte bonvenaj estos proponoj kiuj analizas aspektojn de Esperanto, esperantologio kaj interlingvistiko rilate al la kongresa temo: lingvo, homo kaj medio por pli bona mondo. Ankaŭ proponoj komparante Esperanton, la svahilan lingvon kaj aliajn afrikajn lingvafrancajn – lingvistike, socie, antropologie ktp, ege bonvenus. Surbaze de la prezentoj, kelkaj aŭtoroj estos invitatitaj redakti siajn tekstojn por publikigo en la revuo Esperantologio / Esperanto Studies (Por detaloj pri tiu revuo, vidu ĝian retpaĝon).

Ni invitas ĉiujn fakulojn—aparte junulojn kaj unuafokajn partoprenantojn—sendi proponojn pri referaĵoj. La proponoj, enhavantaj inter 150 kaj 200 vortojn, devas esti sendataj al la retadreso [ek46@interlingvistiko.net](mailto:ek46@interlingvistiko.net). Ni ankaŭ petas ke la proponantoj indiku, ĉu ili intencas prezenti ĉeeste aŭ virtuale. Kandidatoj por virtuala prezento bonvolu noti la tanzanian horzonon, UTC+3.

La limdato por proponoj estas la 30-a de aprilo 2024. Por kontroli la programon de antaŭaj konferencoj, vizitu la retejon de CED.

### **3 FIFTH BIENNIAL REAL SYMPOSIUM: HUMAN CAPITAL, LANGUAGES, AND NEW LITERACIES; THEORIES, POLICIES, AND IMPACTS, 2024-06-03/04**

#### **3.1 Organizantoj**

REAL – Esplorggrupo «Lingvo, politikanalizo kaj ekonomiko» kunlabore kun Ulster University, Universitat de Barcelona kaj Universitat Rovira i Virgili

#### **3.2 Loko**

Universitat Rovira i Virgili, Tarragona

#### **3.3 Temo**

Homa kapitalo, lingvoj kaj novaj legopovoj: Teorioj, politiko kaj efiko

#### **3.4 Priskribo**

Vidu [ĉi tie](#).

## **4 COLLOQUE INTERNATIONAL SUR LES LANGUES CONSTRUITES, I-CONLANG, 2024-07-04/05**

### **4.1 *Organizantoj***

Liĝera Lingvistika Laboratorio (LLL, UMR 7270, Université de Orléans, Université de Tours, BnF, CNRS)

### **4.2 *Loko***

Université de Orléans

### **4.3 *Temo***

La *Simpozio pri la konstruitaj lingvoj* enhavos tri sesiojn, kaj la unua sesio pritraktos ĉefe Esperanton

### **4.4 *Priskribo***

Vidu [ĉi tie](#).

## **II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO**

### **1 CORSO «ENKONDUKO AL INTERLINGVISTIKO»**

Ahmad Mamduhi de Universitato Espero de Kongo (Université Espoir du Congo), Demokratia Respubliko Kongo prezentas retan kurson dum la printempa semestro.

Por pliaj informoj skribu al: [UEC-lingvo-fakultato@gmx.com](mailto:UEC-lingvo-fakultato@gmx.com)




## III KULTURO

### 1 DU ARTIKOLOJ PRI LA INTERLINGVO BĀLAĪBALAN

En la retpaĝoj *Viki de UEA* troviĝas du artikoloj pri la planlingvo Bālaĭbalan

### 2 ESPERANTOMUZEO DE LA AŬSTRIA NACIA BIBLIOTEKO: GAZETELTONDAĴOJ 1898–1915: LA KOLEKTO HACHETTE EN LA INTERRETO

Komence de la 1930-aj jaroj la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko ricevis grandan kolekton de gazeteltondaĵoj. Temas pri pli ol 17 000 gazetartikoloj el la tempo inter 1898 kaj 1915 pri la temoj Esperanto kaj planlingvoj. Komence de la 20-a jarcento tiuj artikoloj estis sisteme kolektitaj de oficejo en Parizo por la eldonejo Hachette, kiu tiutempe eldonis multajn librojn en kaj pri Esperanto. La gazetartikoloj estas laŭlande kaj laŭtempe ordigitaj kaj ili troviĝas en 153 dosierujoj. Dum la pasintaj jaroj la bibliotekistoj de la Esperantomuzeo zorge purigis ĉiujn artikolojn kaj ekzakte listigis la titolojn (de la artikoloj, revuoj kaj rubrikoj), la nomojn (de la verkintoj kaj eldonlokoj) kaj la eldontagojn. Tiel kreiĝis 153 listoj enhavantaj pli ol 17 000 artikolojn. Poste la 153 dosieroj kun ĉiuj gazetartikoloj estis katalogitaj.



ILUSTRADO 2.1 Ekzemplo el la katalogo

En 2024 la servo eĉ pliboniĝis. Por ĉiuj 17 216 gazetartikoloj la bibliotekistoj kreis katalogeron, kiu havas rektan ligilon al la diĝita dokumento. Tio signifas, ke vi povas facile traserĉi la metadatumojn de la artikoloj kaj tiel pli rapide kaj ekzakte trovi viajn deziritajn informojn. Por la plej gravaj enhavoj estis aldonitaj ŝlosilvortoj por pli bonaj serĉebloj.

Se vi interesiĝas ekzemple pri Edmond Privat, Moresnet, la Spesmilo, «Le Concours Michelin» aŭ la 2-a UK en Ĝenevo en 1906, vi nur devas serĉi en la katalogo Trovanto laŭ Privat, Moresnet, Spesmilo, Michelin aŭ «2-a UK 1906», elekti sube je la dekstra flanko la filtrilon «Zeitungsausschnitt» kaj tiam vi ricevas la deziritajn katalogerojn kun ligiloj al la diĝitaj artikoloj.

Nun ni kreas apartan retpaĝon pri la kolekto Hachette, sur kiu vi povos traserĉi ne nur la metadatumojn, sed ankaŭ la plenajn tekstojn de la 17 216 gazetartikoloj. Tiu servo aperos ankoraŭ en printempo 2024 sur la retpaĝo de la ONB Labs.

Pro la katalogado kaj ciferecigo de la kolekto Hachette la katalogo Trovanto nun enhavas pli ol 85 000 katalogerojn de dokumentoj el la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Pli ol 45 000 el tiuj katalogeroj eĉ havas rektan ligilon al la koncerna diĝita dokumento.

*Bernhard Tuidar*

### **3 LE MONDE PUBLIKIGAS ARTIKOLON PRI KONSTRUITAJ LINGVOJ, 2024-01-26**

La franca gazeto *Le Monde* publikigis artikolon de la ĵurnalistino Catherine Rollot pri novaj konstruitaj lingvoj sub la titolo «[Klingon, sindarin, haut valyrien : et si vous appreniez une langue fictive ?](#)»

### **4 TELEVIDA KANALO ARTE PUBLIKIGIS VIDEAĴON PRI VOLAPŬK KAJ ESPERANTO**

La programo Karambolage de la franc-germana televida kanalo Arte, publikigis videaĵon pri volapŭk kaj esperanto. En ĝi la historio de Volapŭk estas pritraktata. Oni rakontas ke temas pri lingvo konstruita je la fino de la 19-a jarcento de la pastro Johann Martin Schleyer, kun la celo servi kiel internacia helpa lingvo. En la videaĵo oni aldonas ke Schleyer, kiu lernis plurajn lingvojn, kreis universalan alfabeton kaj iom post iom evoluigis volapukon, publikigante siajn progresojn en religia ĵurnalo. La lingvo, kiu estis komence bone akceptita en Eŭropo, en Ĉinio kaj en Japanio, malsukcesis pro troa gramatika komplekseco kaj la sinteno de Schleyer mem, kiu volis ĉion kontroli. La falo en la intereso pri Volapŭk estas ankaŭ atribuita al la ekapero de Esperanto, lingvo konstruita de Ludoviko Lazaro Zamenhof en Pollando en 1887. Esperanto, bazita sur latinidaj lingvoj, kun pli simpla gramatiko, ege sukcesis en la frua 20-a jarcento. Esperanto estis eĉ proponita kiel oficiala lingvo de la Societo de Nacioj (antaŭulo de la UN); tamen, Francio, defendante la francan kiel internacian lingvon, kontraŭis tiun iniciaton.

Laŭ Karambolage, hodiaŭ, Volapŭk havas nur historian intereson, kaj ĝiaj parolantoj estas malmultaj. La esprimo «tio estas Volapŭk» fariĝis sinonimo de nekomprenebla aŭ konfuza

lingvaĵo. La video finiĝas per citaĵo de la Ĝeneralo de Gaulle esprimante sian negativan opinion pri la utilo de artefaritaj lingvoj kiel Esperanto aŭ Volapük por la unueco de Eŭropo.

Pliaj informoj:  
[TTT-ejo de arte](#)  
[YouTube](#)

## **5 NOVA AMPLEKSA ARTIKOLO PRI «LINGVA JUSTECO» EN VIKIPEDIO**

En la esperanta versio de Vikipedio ĵus aperis ampleksa artikolo pri [lingva justeco](#).

## **6 LABORRENKONTIĜO PRI DULINGVA GEPATRA INFANFORMIGO, CAROLINE MARSHALL DRAUGHON CENTER FOR THE ARTS & HUMANITIES, AUBURN, ALABAMIO, 2024-11-06**

Esperantic Studies Foundation subtenis laborkunsido, kie oni diskutis, kiel la gepatra lingvo povas travivi pli ol du generaciojn en aliligva etoso.

Pliaj informoj ĉe [Iulia Pittman](#).

## IV PERSONOJ

### 1 WIM JANSEN, 1948 – 2024

La konata esperantologo kaj interlingvisto Wim Jansen forpasis la 2an de februaro 2024 post mallonga malsano. Interlingvistoj verŝajne ĉefe konis lin pro lia laboro kiel universitata profesoro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo (Nederlando). Li tenis tiun postenon inter 2002 kaj 2013, kaj kun granda sukceso. Li instruis kurson pri interlingvistiko kaj enkondukis kurson de Esperanto por studentoj de ĉiuj fakultatoj de la universitato. Li inter aliaj ankaŭ estis ekstera referanto de la doktoriĝa tezo de Federico Gobbo, la nuna Amsterdama katedestro.

Kiel interlingvisto, Jansen interesiĝis ĉefe pri la gramatiko de Esperanto, kiun li pristudis uzante la gramatikan teorion de la t.n. Amsterdama skolo de funkcigramatiko. En 2007 li publikigis (nederlandlingve) *Woordvolgorde in het Esperanto* ([*Vortordo en Esperanto*], LOT Publications 2007), lia doktoriĝa disertaĵo, en kiu li kombinas diversajn empiriajn teknikojn (inter aliaj pristudo de diversaj tekstaroj, analizo de lerniloj kaj enketoj kun spertaj parolantoj) kun teorioj pri la prefero por la vortordo SVO (subjekto-verbo-objekto) en la ĉiutaga lingvo. Mallonga Esperantlingva versio de tiu verko aperis en 2008 kiel *Naturaj vortordoj de Esperanto*, UEA). Post tio, Jansen verkis kelkajn artikolojn pri la morfologio de Esperanto, ĉefe por *Esperantologio*, sed ankaŭ por *Linguistics*. Kiam li mortis, libro pri tiu temo ĵus pretiĝis; ĝi espereble eldoniĝos ĉe eldonejo Bero.

Li ankaŭ verkis kelkajn pli personajn tekstojn pri Esperanto, ekzemple sian «inaŭguran paroladon» (tio estas Nederlanda tradicio) kiel profesoro: *Esperanto, taal om van te houden* [*Esperanto, aminda lingvo*]. Beletra Almanako publikigis eseon en 2022 kun kelkaj memoroj el



lia esperantista vivo, pri la kontaktoj de Jansen kun esperantistoj en centra kaj orienta Eŭropo en 1974. Ankaŭ la patro de Jansen estis esperantisto. Juna Wim lernis la lingvon ĉar li trovis esperantlingvajn librojn en la gepatra domo kaj ne toleris ne kompreni pri kio ili parolis.

Jansen ankaŭ iom aktivis en la Esperanto-movado, ĉefe en Nederlando, kie li membris en la estraroj de Nederlanda Esperanto-Junularo kaj de Esperanto Nederland. Dum la naŭdekaj jaroj li ankaŭ verkis kelkajn informajn broŝurojn pri Esperanto en la nederlanda. Li renkontis sian italan edzinon Marisa dum Internacia Junulara Konferenco en Londono. En 2023 la paro festis 50 jarojn da geedzeco kun siaj 3 gefiloj kaj 8 genepoj. Estas eble malpli konate ke Jansen havis ankaŭ du aliajn esploristajn karierojn. Dum la jaroj 1965-1970, li studis spacan inĝenieradon en la Teknika Universitato de Delft (Nederlando), kaj poste laboris ĝis 1998 por Eŭropa Spaca Agentejo (ESA). Dum tiu laboro li publikigis i.a. *The Story of Moslab* ([*La historio de Moslab*], Noordwijk, European Space Agency, 1993) kaj *Biological Experiments on the Bion-10 Satellite* ([*Biologiaj eksperimentoj en la satelito Bion-10*], Noordwijk, European Space Agency, 2001; kune kun aliaj). Li ankaŭ pristudis en tiu kadro senpezecon, por kio li multe vojaĝis al Rusujo.

Krome, Jansen magistriĝis pri la eŭska lingvistiko en la Universitato de Leiden (Nederlando) sub la gvido de la fama nederlanda eŭskologo Rudolf de Rijk (Wim estis la sola studanto). La iom «ekzotika» karaktero de tiu eŭropa sed ne hindeŭropa lingvo altiris lin al profunda pristudo. En 1996 li publikigis la unuan vortaron Eŭskan-Nederlandan kaj Nederlandan-Eŭskan. Krome li ankaŭ estas la aŭtoro de anglalingva lernolibro de la eŭska (*Beginner's Basque* [*La eŭska por komencantoj*], Hippocrene Books Inc., New York, 2002), de traduko de infanlibro el la eŭska al la nederlanda (*Het geheim van het meer* [*La sekreto de la lago*], Groningen, Gopher Publishers, 2001), de libro pri la historio de la eŭskologio en Nederlando (*Veldwerkers en vrouwen in en om Baskenland* [*Esploristoj kaj virinoj en kaj ĉirkaŭ Eŭskio*], Leiden, Gingko, 2018), kaj multaj aliaj. Li kelkfoje ankaŭ kombinis sian intereson pri Esperanto kaj la eŭska; en 2016 aperis la lernolibro *Ni lernu la eŭskan* kaj en 2018 *Mil eŭskaj proverboj*.

Jansen estis multtalenta, modesta homo, kiu preferis teni iom da distanco. Li plurfoje malakceptis petojn membriĝi en la Akademio de Esperanto, por ne altiri tro da atento. Li estis ĉiam afabla, kaj vera sinjoro kies lingvoscio estis senpeka en ĉiuj ok lingvoj kiujn li parolis.

*Marc van Oostendorp*

## **2 KARIERA SALTO DE BAŞAK ARAY**

Başak Aray ĵus estis nomita Asistanta profesoro pri filozofio ĉe Boğaziçi Üniversitesi, kie ŝi ankaŭ planas instrui interlingvistikon

## **3 SABINE FIEDLER EMERITIĜIS 2023-11**

### **3.1 Biografio**

- Edukado
  - 1976-10 –1980-07 studis la anglan kaj rusan, Martin-Luther-Universität Halle-Wittenberg
  - 1986-08 doktoriĝis pri angla lingvistiko, Universität Leipzig

- 1999-04 habilitiĝis pri ĝenerala lingvistiko/interlingvistiko, Universität Leipzig
- Profesia kariero
  - 1980-08 – 1983-08 Lerneja instruisto de la angla kaj rusa
  - 1983-09 – 1986-08 Esplorasistento, Universität Leipzig
  - 1986-09 – 1992-09 Instruisto ĉe Instruisteduka altlernejo, Leipzig
  - 1992-10 – 2023-11 Instruisto/Profesoro kaj Esploristo ĉe la Instituto pri britiaj studoj, Universität Leipzig
- Aliaj aktivaĵoj
  - 2007-03 – 2007-07 Provizora Profesoro pri angla lingvistiko, Johann-Wolfgang-von-Goethe-Universität Frankfurt am Main
  - 2007-07 – 2007-08 Vizitanta Profesoro, Kent State University, Ohio, Usono
  - 2008-10 – 2009-02 Provizora Profesoro pri angla lingvistiko, Universität Erfurt
  - 2014-03 – 2018-08 Taskgvidanto kaj respondeca pri komunikado helpe de lingvafrankaĵoj de esplorprojekto «[Movebleco kaj inkluziv-eco en multlingva Eŭropo](#)», MIME, financita de FP7 de la Eŭropa Unio
  - 2015-10 – 2023-02 Instruado ĉe Universität Leipzig de modulo pri internacia lingva komunikado kiel defio por politiko kaj socio dum ĉiu vintra semestro. La anglalingvan modulon konsistigis tri temaroj: prelegoj pri planlingvoj, seminario «English in a Global Context» / «Language & Mobility» kaj lingvokurso esperanto.

Pliaj informoj:

[Sabine Fiedler ĉe Vikipedio DE](#)

[Sabine Fiedler ĉe Vikipedio EO](#)

[Sabine Fiedler ĉe Google.de](#)

[Sabine Fiedler ĉe Googl.com](#)

[Sabine Fiedler ĉe Universität Leipzig](#)

## 3.2 Bibliografio

### 3.2.1 Libroj

- FIEDLER, Sabine (1991). *Fachtextlinguistische Untersuchungen zum Kommunikationsbereich der Pädagogik (dargestellt an relevanten Fachtextsorten im Englischen)*, germana. Frankfurt am Main: Peter Lang. ISBN: 978-3-631-43468-0.
- (1999c). *Plansprache und Phraseologie. Empirische Untersuchungen zu reproduziertem Sprachmaterial im Esperanto*, germana. Frankfurt am Main: Peter Lang. ISBN: 978-3-631-34088-2.

- FIEDLER, Sabine (2002b). *Esperanta frazeologio*, Rotterdam: Universala Esperanto Asocio. ISBN: 9290170808.
- (2003d). *Sprachspiele im Comic. Das Profil der deutschen Comic-Zeitschrift MOSAIK*, germana. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag. ISBN: 978-3-937209-41-8.
- (2004b). *Ilustrita frazeologio*, ilustrita de Pavel RAK. Dobřichovice: Kava-Pech. ISBN: 9788085853575.
- (2007a). *English phraseology. A coursebook*, angla. Tübingen: Narr. ISBN: 978-3-8233-6338-5.
- (2012b). *Englische Redewendungen und Sprichwörter in der Praxis*, germana. Leipzig: Engelsdorfer Verlag. ISBN: 978-3-86268-867-8.
- (2014b). *Gläserne Decke und Elefant im Raum: phraseologische Anglizismen im Deutschen Berlin: Logos Verlag. 2014*. ISBN: 978-3-8325-3722-7, germana. Berlin: Logos Verlag. ISBN: 978-3-8325-3722-7.
- FIEDLER, Sabine kaj Cyril Robert BROSCH (2019). *Der Erasmus-Studienaufenthalt – Europäische Sprachvielfalt oder Englisch als Lingua franca?*, germana. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag. ISBN: 978-3-96023-299-5.
- (2022a). *Esperanto – Lingua franca and language community*, angla. Studies in World Language Problems 10. Amsterdam: John Benjamins Publishing Company. ISBN: 9789027211477. DOI: [doi.org/10.1075/wlp.10](https://doi.org/10.1075/wlp.10).

### 3.2.2 Fakrevuaj artikoloj

#### 3.2.2.1 1981 – 1990

- FIEDLER, Sabine (1986). «Der Eigenname als Konstituente des pädagogischen Fachwortschatzes», germana. En: *Namenkundliche Informationen Beiheft*. **9**: 13–19.
- (1989). «Fachtextlinguistische Untersuchungen zum englischsprachigen Zeitschriftenartikel im Kommunikationsbereich Geschichte», germana. En: *Wissenschaftliche Zeitschrift der Pädagogischen Hochschule «Clara Zetkin» Leipzig*: 57–60.

#### 3.2.2.2 1991 – 2000

- FIEDLER, Sabine (1995a). «Fachkommunikation in Plansprache und Ethnosprache: Zu Ergebnissen vergleichender Fachtextanalysen aus interkultureller Sicht», germana. En: *Fremdsprachen Lehren und Lernen* **24 1**: *Zur Theorie und Praxis des Sprachunterrichts an Hochschulen*. Redaktis Claus GNUTZMANN: 182–196. ISSN: 0932-6936.
- (1999b). «Phraseology in planned languages», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **23 2**: 175–187. ISSN: 0272-2690. DOI: [doi.org/10.1075/lplp.23.2.05fie](https://doi.org/10.1075/lplp.23.2.05fie).



### 3.2.2.3 2001 – 2010

- FIEDLER, Sabine (2006b). «Standardization and self-regulation in an international speech community: the case of Esperanto», angla. En: *International Journal of the Sociology of Language* **177**: 67–90. DOI: [doi.org/10.1515/IJSL.2006.005](https://doi.org/10.1515/IJSL.2006.005).
- (2008a). «Interlinguistics and Esperanto studies at universities: Experience at the University of Leipzig», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **32 3**: 269–279. ISSN: 0272-2690. DOI: [doi.org/10.1075/lplp.32.3.06fie](https://doi.org/10.1075/lplp.32.3.06fie).
- (2010a). «A fraseoloxía do esperanto», portugala. En: *Cadernos de Fraseoloxía Galega* **12**: 127–139. ISSN: 1698-7861.
- (2010b). «Approaches to fair linguistic communication», angla. En: *European Journal of Language Policy* **2 1**: 1–21. DOI: [doi.org/10.3828/ejlp.2010.2](https://doi.org/10.3828/ejlp.2010.2). URL: <https://www.liverpooluniversitypress.co.uk/doi/abs/10.3828/ejlp.2010.2>.
- (2010e). «Phraseology in a time of crisis: The language of bank advertisements before and during the financial crisis of 2008–2010», angla. En: *Yearbook of Phraseology* **1 1**: 1–18. DOI: [doi.org/10.1515/9783110222623.1.1](https://doi.org/10.1515/9783110222623.1.1).
- (2010f). «The English-as-a-lingua-franca approach: Linguistic fair play?», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **34 3**: 201–221. ISSN: 0272-2690. DOI: [doi.org/10.1075/lplp.34.3.01fie](https://doi.org/10.1075/lplp.34.3.01fie).

### 3.2.2.4 2011 – 2020

- FIEDLER, Sabine (2011b). «English as a lingua franca – a native-culture-free code? Language of communication vs. language of identification», angla. En: *Apples – Journal of Applied Language Studies* **5 3**: 79–97. URL: <https://apples.journal.fi/article/view/97829>.
- (2012c). «The Esperanto *denaskulo*: The status of the native speaker of Esperanto within and beyond the planned language community», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **36 1**: 69–84. ISSN: 0272-2690. DOI: [doi.org/10.1075/lplp.36.1.04fie](https://doi.org/10.1075/lplp.36.1.04fie).
- (2014a). «ELF and the alternatives: comments on Ian MacKenzie’s <Topic & Comment>», angla. En: *Journal of English as a Lingua Franca* **3 2**: 395–407. DOI: [doi.org/10.1515/jelf-2015-0023](https://doi.org/10.1515/jelf-2015-0023).
- (2014d). «Scientific communication in a lingua franca», angla. En: *Język Komunikacja Informacja* **9**: 48–57. ISSN: 1896-9585.
- (2015a). «Esperanto phraseology», angla. En: *Interdisciplinary Description of Complex Systems* **13 2**: *The phenomenon of Esperanto*. Redaktis Humphrey TONKIN kaj Veronika POÓR: 250–263. ISSN: 1334-4684. DOI: [doi.org/10.7906/indecs.13.2.5](https://doi.org/10.7906/indecs.13.2.5).



- FIEDLER, Sabine (2015b). «Frequency dictionaries for esperanto», angla. En: *Język Komunikacyjna Informacja* **10**: numer specjalny interlingwistyka i esperantologia. Redaktis Ilona KOUTNY: 155–169. ISSN: 1896-9585.
- (2015e). «The topic of planned languages (Esperanto) in the current specialist literature», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **39** **1**: 84–104. ISSN: 0272-2690. DOI: [doi.org/10.1075/lplp.39.1.05fie](https://doi.org/10.1075/lplp.39.1.05fie).
- (2017a). «Lingua-franca-Kommunikation – wirklich ein Fall des Let-it-pass? (Eine Analyse von Reparaturen in der Esperanto-Kommunikation)», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 57–71.
- (2017b). «Phraseological borrowing from English into German: Cultural and pragmatic implications», angla. En: *Journal of Pragmatics* **113**: 89–102. ISSN: 0378-2166. DOI: [doi.org/10.1016/j.pragma.2017.03.002](https://doi.org/10.1016/j.pragma.2017.03.002). URL: <https://www.sciencedirect.com/science/article/pii/S0378216616303009>.
- (2018a). «Esperanto und die Mehrsprachigkeit», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 35–84.
- (2018b). «Linguistic and pragmatic influence of English: Does Esperanto resist it?», angla. En: *Journal of Pragmatics* **133**: 166–178. ISSN: 0378-2166. DOI: [doi.org/10.1016/j.pragma.2018.05.007](https://doi.org/10.1016/j.pragma.2018.05.007).
- (2018d). «Phraseological anglicisms in German: A look at a satirical TV program», angla. En: *Lenguas para Fines Específicos* **24** **1**: *Special Issue: Anglicisms in Domain-Specific Discourse: Fashion, Leisure and Entertainment*. Redaktis Carmen LUJÁN GARCÍA kaj Virginia PULCINI: 71–95. ISSN: 1133-1127.
- (2019). «La phraséologie de l’espéranto comme preuve de l’expressivité et du caractère vivant d’une langue planifiée», franca. En: *Cahiers de l’ILSL* **61**: *Interlinguistique et esperantologie*. Redaktis Sébastien MORET: 75–109.
- FIEDLER, Sabine kaj Cyril BROSCH (2017). «Der spezifische Beitrag des Esperanto zum propädeutischen Effekt beim Fremdsprachenlernen (mit Schwerpunkt auf der Erwachsenenphase)», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 11–38.
- (2018). «Esperanto – a lingua franca in use: A case study on an educational NGO», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **42** **2**: 220–245. ISSN: 0272-2690. DOI: <https://doi.org/10.1075/lplp.00019.fie>. URL: <https://www.jbe-platform.com/content/journals/10.1075/lplp.00019.fie>.
- FIEDLER, Sabine kaj Agnes WOHLFARTH (2018). «Language choices and practices of migrants in Germany: An interview study», angla. En: *Language Problems and Language Planning* **42** **3**: 267–287. ISSN: 0272-2690. DOI: <https://doi.org/10.1075/lplp.00023.fie>. URL: <https://www.jbe-platform.com/content/journals/10.1075/lplp.00023.fie>.

### 3.2.2.5 2021 –

- FIEDLER, Sabine (2022a). ««[...] a slim core of Esperanto roots [...] and a huge periphery of (English) borrowings»? Ĉu Esperanto fariĝas pli kaj pli angleca?», en: *Esperantologio/ Esperanto Studies* **3** (11): 8–21. ISSN: 1311-3496.
- (2022b). «English as a lingua franca and linguistic justice: insights from exchange students' experiences», angla. En: *International Journal of the Sociology of Language* **277**: *Special Issue: Linguistic justice and global English*. Redaktis Josep SOLER kaj Sergi MORALES-GÁLVEZ: 17–32. DOI: [doi:10.1515/ijsl-2021-0075](https://doi.org/10.1515/ijsl-2021-0075). URL: <https://doi.org/10.1515/ijsl-2021-0075>.
- (2022d). «Literarischer Translingualismus in Ethno- und Plansprache», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 45–56. ISSN: 2567-5958.
- (2022f). ««Mit dem Topping bin ich auch fein» – Anglicisms in a German cooking show», angla. En: *Espaces Linguistiques* **4**: *Anglicismes : variétés diatopiques et genres textuels*. Redaktis Ramón MARTÍ SOLANO, Cristiano FURIASSI kaj José Luis ONCINS MARTÍNEZ. ISSN: 2729-3548. DOI: [doi.org/10.25965/espaces-linguistiques.488](https://doi.org/10.25965/espaces-linguistiques.488). URL: <https://www.unilim.fr/espaces-linguistiques/488>.
- (2023a). «Buchvorstellung: Erich-Dieter Krause *Vollständiges Wörterbuch Deutsch Esperanto*», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 127–135.
- (2023b). «Interlinguistik for future? – Einige Überlegungen zu Zielen und zur Zukunft der Interlinguistik», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 39–47.
- (2023c). ««Keep calm and carry on» – From a wartime slogan to one of the most frequently modified proverbs», angla. En: *Proverbium – Online Supplement* **2**: *Diligens brings delight: A Festschrift in honour of Anna T. Litovkina on the occasion of her 60th birthday*. Redaktis Hrisztalina HRISZTOVA-GOTTHARDT, Melita Aleksa VARGA kaj Wolfgang MIEDER: 13–26.
- MEHLHORN, Grit, Sabine FIEDLER kaj Peter BALÁŽ (2021). «Sprachenlernen mit digitalen Medien: Vorstellung des Erasmusprojekts TestU», germana. En: *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik*: 91–103. ISSN: 2567-5958.

## 3.2.3 Libroartikoloj

### 3.2.3.1 1981 – 1990

- FIEDLER, Sabine (1985). «Kommunikationsverfahren in einem englischen Handbuch der Pädagogik», germana. En: *Fachsprachliche Textlinguistik: Vorträge der sprachwissenschaftlichen Arbeitstagung an der Sektion Fremdsprachen der Karl-Marx-Universität Leipzig am 11. und 12. Dezember 1984*. Redaktis Rosemarie GLÄSER. Berlin: Akademie der Wissenschaften der DDR, Zentralinstitut für Sprachwissenschaft: 112–117.

FIEDLER, Sabine (1987). «Untersuchungen zum pädagogischen Fachwortschatz im Englischen», germana. En: *Beiträge zur anglistischen Fachsprachenforschung*. Redaktis Rosemarie GLÄSER. Leipzig: Karl-Marx-Universität.: 1–22.

### 3.2.3.2 1991 – 2000

- FIEDLER, Sabine (1992). «Die pädagogische Rezension im Englischen und Esperanto», germana. En: *Kontrastive Fachsprachenforschung*. Redaktis Klaus-Dieter BAUMANN kaj Hartwig KALVERKÄMPER. Forum für Fachsprachen-Forschung 20. Tübingen: Gunter Narr Verlag: 147–161.
- (1995b). «Linguistische Fachtexte im Englischen, Deutschen und Esperanto (ein interkultureller Vergleich)», germana. En: *Fachkommunikation: Kongreßbeiträge zur 24. Jahrestagung der Gesellschaft für Angewandte Linguistik GAL e.V.* Redaktis Dieter WOLFF. Forum Angewandte Linguistik 27. Frankfurt am Main: Peter Lang: 68–71. ISBN: 9783631477069.
- (1995c). «Untersuchungen zur Phraseologie des Esperanto: Sprichwörter», germana. En: *Texte als Gegenstand linguistischer Forschung und Vermittlung: Festschrift für Rosemarie Gläser*. Redaktis Ines-Andrea BUSCH-LAUER, Sabine FIEDLER kaj Marion RUGE. Leipziger Fachsprachen-Studien 10. Frankfurt am Main: Peter Lang: 173–191. ISBN: 978-3-631-48665-8.
- (1996a). «Der Phraseologismus als Übersetzungsproblem», germana. En: *Translation in Plansprachen: Beiträge gehalten auf der 5. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., November 1995 in Berlin*. Redaktis Ulrich BECKER. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 1. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 48–51.
- (1996b). «Norvega rato oder migra rato? Zu Fachwörtern mit onymischer Konstituente im Esperanto», germana. En: *Eigennamen in der Fachkommunikation*. Redaktis Rosemarie GLÄSER. Leipziger Fachsprachen-Studien 12. Frankfurt am Main: Peter Lang: 121–130. ISBN: 978-3631500446.
- (1997). «Intertextualität in der Plansprache (dargestellt an publizistischen und literarischen Texten im Esperanto)», germana. En: *Textbeziehungen: Linguistische und literaturwissenschaftliche Beiträge zur Intertextualität*. Redaktis Josef KLEIN kaj Ulla FIX. Stauffenburg linguistik 5. Tübingen: Stauffenburg Verlag: 383–402. ISBN: 978-3-86057-705-9.
- (1998a). «Esperanto phraseology: Classification and usage», angla. En: *Europhras 97: Phraseology and paremiology*. Redaktis Peter ĎURČO. Bratislava: Akadémia Policajného zboru: 96–101. ISBN: 9788080540777.
- (1998b). «Zu Merkmalen der Esperanto Sprachgemeinschaft (Ergebnisse einer Probandenbefragung)», germana. En: *Soziokulturelle Aspekte von Plansprachen: Beiträge gehalten auf der 7. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 7. – 9. November 1997 in Berlin*. Redaktis Ulrich BECKER. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 4. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 22–29.

- (1999a). «Die neuere Fachsprache der Pädagogik im Englischen», germana. En: *Fachsprachen / Languages for Special Purposes: Ein internationales Handbuch zur Fachsprachenforschung und Terminologiewissenschaft / An international handbook of special-language and terminology research*. Redaktis Lothar HOFFMANN, Hartwig KALVERKÄMPER kaj Herbert Ernst WIEGAND. Volumo 2. Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft / Handbooks of linguistics and communication science 14/2. Berlin: de Gruyter: 1472–1447.
- (1999d). «Zum Übersetzen von Phraseologismen in die Plansprache (dargestellt an literarischen Übersetzungen im Esperanto)», germana. En: *Phraseologie und Übersetzen*. Redaktis Annette SABAN. Bielefeld: Aisthesis-Verlag: 59–80. ISBN: 978-3-89528-229-4.
- (1999e). «Zur Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch von Eugen Wüster», germana. En: *Interlinguistik und Lexikographie: Beiträge gehalten auf der 8. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 6. – 8. November 1998 in Berlin*. Redaktis Ulrich BECKER. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 5. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 33–39.

### 3.2.3.3 2001 – 2010

- FIEDLER, Sabine (2001a). «Bela dam', ĉu al vi plaĉus, se akompanon mi kuraĝus? Zur Übersetzung von Goethes <Faust> ins Esperanto», germana. En: *Sprachenpolitik in Europa: Beiträge einer Veranstaltung des «Vereins zur Förderung sprachwissenschaftlicher Studien e.V.» (VFsS) und der «Gesellschaft für Interlinguistik e.V.» (GIL) am 13. November 1999 sowie der 9. Jahrestagung der GIL., 12. – 14. November 1999, in Berlin*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 6. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 128–145.
- (2001b). «Naturalismus und Autonomismus in Plansprachen dargestellt am Beispiel der Phraseologie», germana. En: *Zur Struktur von Plansprachen: Beiträge der 10. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 17. – 19. November 2000, in Berlin*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 7. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 75–92.
- (2002a). «Die Esperanto-Übersetzung in Geschichte und Gegenwart», germana. En: *Geschichte der Übersetzung : Beiträge zur Geschichte der neuzeitlichen, mittelalterlichen und antiken Übersetzung*. Redaktis Bogdan KOVTYK, Gerhard MEISNER kaj Hans-Joachim SOLMS. Angewandte Sprach- und Übersetzungswissenschaft 3. Berlin: Logos Verlag: 17–36. ISBN: 978-3-89722-926-6.
- (2002c). «On the main characteristics of Esperanto communication», angla. En: *Lingua franca communication*. Redaktis Karlfried KNAPP kaj Christiane MEIERKORD. Frankfurt am Main: Peter Lang: 53–86. ISBN: 9783631364604. DOI: [doi.org/10.3726/978-3-653-04730-1](https://doi.org/10.3726/978-3-653-04730-1).
- (2003a). «Eugen Wüster als Lexikograph: Rolle und Darstellungsweise von Phraseologie im Enzyklopädischen Wörterbuch Esperanto-Deutsch», germana. En: *ProCom '98, Sektion 3: Terminologiewissenschaft und Plansprachen: Beiträge der internationalen Konferenz «Pro-*

*professional communication and knowledge transfer*», Wien, 24. – 26. August 1998. *Infoterm \* TermNet*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 10. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 86–99.

- FIEDLER, Sabine (2003b). «Merkmale computervermittelter Kommunikation (dargestellt am Beispiel einer Comic-Fan-Gemeinschaft)», germana. En: *Plansprachen und elektronische Medien: Beiträge der 12. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 6. – 8. Dezember 2002, in Berlin*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 9. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 54–63.
- (2003c). «Pri frazeologio en la Enciklopedio Vortaro Esperanta-Germana de Eugen Wüster», en: *Klaro kaj elasto: Festlibro por la 80a naskiĝtago de Fernando de Diego*. Redaktis Reinhard HAUPENTHAL kaj Irmi HAUPENTHAL. Schliengen: Edition Iltis: 171–182. ISBN: 978-3-932807-26-8.
- (2003e). «Untersuchungen zur Phraseologie des Esperanto», germana. En: *Flut von Texten – Vielfalt der Kulturen: Ascona 2001 zur Methodologie und Kulturspezifität der Phraseologie*. Redaktis Harald BURGER, Annelies HÄCKI BUHOFFER kaj Gertrud GRECIANO. Phraseologie und Parömiologie 14. Baltmannsweiler: Schneider Verlag Hohengehren: 317–327. ISBN: 9783896766779.
- (2004a). «Das Sprichwort im Comic (dargestellt am Beispiel der deutschen Comic-Zeitschrift MOSAIK)», germana. En: *Res humanae proverbiorum et sententiarum.: Ad honorem Wolfgangi Mieder*. Redaktis Csaba FÖLDES. Tübingen: Gunter Narr Verlag: 89–100. ISBN: 978-3-8233-6092-6.
- (2005a). ««English as a Lingua Franca» (Zum Modell eines nichtmuttersprachlichen Englisch im Vergleich zum Esperanto)», germana. En: *Internationale Plansprachen – Entwicklung und Vergleich: Beiträge der 14. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 5. – 7. November 2004, in Berlin*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 12. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 9–21.
- (2005b). «Phraseologismen in Comedy-Programmen: Die Harald-Schmidt-Show (2002–2003)», germana. En: *Deutsch als Fremdsprache: Konturen und Perspektiven eines Faches. Festschrift für Barbara Wojtak zum 65. Geburtstag*. Redaktis Antje HEINE, Mathilde HENNING kaj Erwin TSCHIRNER. München: iudicum: 181–198. ISBN: 978-3-89129-598-4.
- (2005c). «Phraseology as a learning aim and aid: Language play in the classroom», angla. En: *Phraseology 2005. The many faces of Phraseology. An interdisciplinary conference / Phraséologie 2005. La phraséologie dans tous ses états. Colloque interdisciplinaire*. Redaktis Christelle COSME, Céline GOUVERNEUR kaj Fanny MEUNIER. Louvain-la-Neuve: Université catholique de Louvain: 133–135.
- (2006a). «Nudpieda Gen – Hadashi no Gen in an International Speech Community», angla. En: *Reading Manga: Local and Global perceptions of Japanese comics*. Redaktis Jaqueline BERNDT kaj Steffi RICHTER. Mitteldeutsche Studien zu Ostasien 11. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag: 59–76. ISBN: 978-3-86583-123-1.



- (2006c). ««Willkommen zurück!» – Zum Einfluss des Englischen auf die Phraseologie der deutschen Gegenwartssprache», angla. En: *Phraseology in Motion I: Methoden und Kritik. Akten der Internationalen Tagung zur Phraseologie (Basel, 2004)*. Redaktis Annelies HÄCKI BUHOFFER kaj Harald BURGER. *Phraseologie und Parömiologie* 19. Baltmannsweiler: Schneider Verlag Hohengehren: 451–465. ISBN: 978-3834001009.
- (2007b). «Ludische Kommunikation in und um Comics: Eine Analyse zur Sprache der Comic-Zeitschrift MOSAIK und ihrer Fans», germana. En: *Das Vergnügen in und an den Medien: Interdisziplinäre Perspektiven*. Redaktis Michael KLEMM kaj Eva-Maria JAKOBS. *Bonner Beiträge zur Medienwissenschaft* 6. Frankfurt am Main: Peter Lang: 177–197. ISBN: 9783631561119.
- (2008b). «Interlinguistik an Universitäten – Erfahrungen aus Leipzig», germana. En: *Plansprachliche Bibliotheken und Archive: Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 23. – 25. November 2007, in Berlin*. Redaktis Detlev BLANKE. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 15. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 121–142.
- (2008c). «Phraseologismen in J.D. Salingers Roman «Der Fänger im Roggen»: Eine übersetzungswissenschaftliche Studie», germana. En: *Beiträge zur Phraseologie aus textueller Sicht*. Redaktis Carmen MELLADO BLANCO. *PHILOLOGIA – Sprachwissenschaftliche Forschungsergebnisse* 112. Hamburg: Verlag Dr. Kovač: 115–133. ISBN: 978-3-8300-2599-3.
- (2009a). «Aktualaj problemoj de internacia komunikado: ĉu English as a lingua franca aŭ planlingvo?», en: *Международные языки в контексте евролингвистики и интерлингвистики / Internaciaj lingvoj en konteksto de eŭrolingvistiko kaj interlingvistiko: Материалы международной конференции (Тарту, 25-26.09.2009)*. Redaktis Aleksandr D. DULIČENKO. *Interlinguistica Tartuensis* 9. Tartu: Tartu Ülikool: 72–82. ISBN: 9949-11-130-7.
- (2009b). ««Am Ende des Tages zählt die Performance.» – Der Einfluss des Englischen auf die Phraseologie der deutschen Gegenwartssprache», germana. En: *Phraseologie global – areal – regional: Akten der Konferenz EUROPHRAS 2008 vom 13.-16.8.2008 in Helsinki*. Redaktis Jarma KORHONEN, Wolfgang MIEDER, Elizabeth PIIRAINEN kaj Rosa PIÑEL. Tübingen: Narr Verlag: 163–172. ISBN: 978-3-8233-6508-2.
- (2009d). «Lingua-franca-Kommunikation: Eine vergleichende Studie Englisch – Esperanto», germana. En: *Sprachenpolitik und Sprachkultur*. Redaktis Detlev BLANKE kaj Jürgen SCHARNHORST. 2-a eldono. *Sprache – System und Tätigkeit* 57. Frankfurt am Main: Peter Lang: 179–204. ISBN: 978-3-631-58579-5. [Originale eldonita kiel: «Sprachenpolitik und Sprachkultur». Frankfurt am Main: Peter Lang, 2007.]
- (2009e). «Non-verbal representations of idioms – a challenge for language learners», angla. En: *Cross-linguistic and cross-cultural approaches to phraseology: ESSE-9, Aarhus, 22-26 August, 2008*. Redaktis T. atiana N. FEDULENKOVA. Arkhangelsk: Pomorsky State University: 55–72.

- FIEDLER, Sabine (2009f). «Phraseology and Proper Names: Textual Occurrences in the Press and in Literature», germana. En: *Phraseologie disziplinär und interdisziplinär*. Redaktis Csaba FÖLDES. Tübingen: Gunter Narr Verlag: 323–336. ISBN: 978-3823365341.
- (2010d). «Kultur und Plansprache: Betrachtungen zum Esperanto.», germana. En: *Kaleidoskop der Kulturen*. Redaktis Ines-Andrea BUSCH-LAUER. Studien zu Fach, Sprache und Kultur 1. Berlin: Frank & Timme: 181–202. ISBN: 978-3-86596-301-7.
- (2010g). «Zur Rolle des Muttersprachlers innerhalb und außerhalb der Esperanto-Sprachgemeinschaft», germana. En: *Die Rolle von Persönlichkeiten in der Geschichte von Plansprachen: Beiträge der 19. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e. V., 27. – 29. November 2009 in Berlin*. Redaktis Sabine FIEDLER. Beihefte der Interlinguistischen Informationen 17. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik e. V.: 163–174.
- 3.2.3.4 2011 – 2020
- BROSCH, Cyril kaj Sabine FIEDLER (2018). «Esperanto and linguistic justice: An empirical response to sceptics», angla. En: *Language policy and linguistic justice: Economic, philosophical, and sociolinguistic approaches*. Redaktis Michele GAZZOLA, Torsten TEMPLIN kaj Bengt-Arne WICKSTRÖM. Heidelberg: Springer. Ĉapitro 17: 499–536.
